



Agado Espero

ESPERANTISTOJ INSTRUAS RIFUĜINTOJN

Esperanto-klubo Stelaro, malgraŭ ĉiuj propraj malfacilaĵoj en Kongolando decidis helpi homojn kiuj estas en ankoraŭ pli malbona situacio. Temas pri rifuĝintoj el Angolo, kiuj vivas en tendaro en Kiluoka, apud Lukala, Kongolando. La projekto estas: instrui Esperanton al la Angolanoj kaj samtempe instrui al ili skribadon kaj legadon."

La projekto estas sukcesa danke al la libraj donacoj ricevitaj de pluraj esperantistoj.

La helpantoj emfazas ke ili bezonas ankoraŭ lernolibrojn de Espe-

ranto en la portugala kaj en la franca kaj ne monon. Donacojn oni povas sendi al: Jeremie Ngoma Kikondolo, B.P. 7598, Kinshasa I, Demokratia Respubliko Kongo



Se iu volas mone helpi, prefere sendu al la fondaĵo Afriko de UEA kun indiko: Por la projekto "Kongolandoj helpas Angolanojn".

Tiu mono iros al la landa asocio DKEA kiu gin disponigos laŭeble efike.

Hans Bakker

Katelenstraat, 231-II, NL-1082
EG Amsterdam, Nederlando

IMITINDE: PURIGI LA TABULOJN

La 16-an de septembro je ĉeesto de invititaj ĵurnalistoj lokaj esperantistoj purigis bronzan tabulon kun bareliefo de Ludoviko Zamenhof pendanta ĉe la strato nomita pri la iniciatinto de nia lingvo en Lodz, Polio. Purigitaj estis ankaŭ ĉiuj strataj tabuletoj laŭlonge de lia strato. Tiu ĉi agado okazis dum la 81-a datreveno de dono de la nomo de L. Zamenhof al la unua strato en Pollando kaj estis samtempe bona okazo por propagandi per flugfolioj la ideon de internacia lingvo kaj rememorigi al



loĝantaro pri ekzisto de E-movado en la urbo.

La evento, malgraŭ ke sen iu granda impeto, fruktis per intervjuoj en du lokaj radioj, raporto en loka televidilo kaj lokaj gazetoj kaj anonco de pli granda artikolo en la gazeto. Esperantistoj el Lodz per sia agado volus ankaŭ alvoki fondintojn de ĉiuj tabuloj kaj monumentoj al zorgado pri ili. Ili ankaŭ insiste persvadas al samideanoj el tuta Esperantujo imitadon.

Aleksander Kaminski
ul. Prochnika 1

PL-94-108 Lodz, Polio
Rete: esperant@ikki.com.pl

LINGVA FESTIVALO EN ĈEBOKSARI

La 5-a Lingva Festivalo okazis en oktobro en la ĉuvaŝa ĉefurbo, Ĉeboksari, Rusio. Por partopreni la festivalon venis pli ol 190 homoj, plejparte lernantoj kaj studentoj. Estis prezentitaj 26 lingvoj pere de 34 prezentantoj. Esperanto estis

prezentita kvar fojojn. La aranĝon sekvis granda intereso de la loka publiko. La lingvojn prezentis esperantisto-rezentantoj de pluraj landoj. La lokan loĝantaron denove surprizis tiu ĉi aranĝo. Multaj homoj povis eksperti plurajn fremdajn lingvojn. Post prezentado de lingvoj okazis solena fermo kaj, koncerto.

laŭ Katja Evlampieva

SUBVENCIO DE BANKO AL ESPERANTO

La plej prestiĝa banko en Kroatio, la Zagreba Banko, subvencias ĉiujare ses projektofakojn. La ĉi jaran subvencion en la fako Junularo gajnis Kroata Esperanto-Ligo por projekto pri partoprenigo de junaj esperantistoj en la 86-a Universala Kongreso de Esperanto en Zagrebo. La projekto celas pagi partoprenkotizon de junaj aktivuloj el Kroatio, kiuj helpos en la realigo de UK.

Inter 460 projektoj pri junularaj aranĝoj en Kroatio la juĝkomisiono taksis tiun de KEL la plej bona. Krom ĝi, la Zagreba Banko subvenciiis ankaŭ 46 aliajn projektojn. Prof. Dalibor Brozoviĉ, prezidanto de KEL, akceptis la dokumentojn pri la subvencio dum solena ceremonio la 27-an de septembro.

Estas menciinde, ke en la fako Arto la printempan premion de la Zagreba Banko ricevis la teatra ensemblo Ponto de Vida Jerman por la prezento de la teatraĵo "Poto" en la Tel-Aviva UK. En la sama branĉo Romana Rozic, esperantistino-filmreĝisorino, ricevis subtenon por sia filmo.

Co de UEA

ISRAELA PREZIDANTO RESALUTIS

En la ferma solenaĵo de la 85-a UK en Tel-Avivo la kongresanoj sendis gratulmesaĝon al s-ro Moshe Katsav, membro de la Honora Komitato de la UK, pro lia ĵus okazinta elekto al la ofico de la prezidanto de la kongresa lando. Nome de la kongresanoj la mesaĝon subskribis Kep Enderby, prezidanto de UEA, kaj Amri Wandel, prezidanto de LKK.

Prezidento Katsav dankis la gratulojn per dankletero al prof. Wandel.

Retpoŝta
E-novaĵservo

RET-INFO

ret-info@esperanto.org

ĈU MANIFESTI KAJ CIVITI?

daŭrigo de la antaŭa numero

4. Principe, oni ne povas argumenti kontraŭ la serĉo de pli efikaj strukturoj. Sed se oni ankaŭ uzas siajn fortojn por malvalorigi la laboron de aliaj, konstruante paralelajn strukturojn konkurence kaj malakcepte al la jam malfacile vivigeblaj ekzistantaj (UEA kaj aliaj tradiciaj strukturoj), tio estas bedaŭrinda, aparte por malforta lingvo-komunumo.

Ĉu traleginto de la 33 artikoloj kun sume 99 paragrafoj kaj sublineoj de la Projekto de Konstitucia Ĉarto de la Esperanta Civito (vidu en Literatura Foiro 181) ne devas ekpensi, ke temas pri lerta satiro? Mi timas, ke ne estas.

Por "konstrui" tian "Civiton" necesas grandega investo en administrajn aferojn. Oni bezonas multajn kapablajn homojn por funkciigi tian organismon. La atingebla rezulto ne pravigos tiajn fortostreĉojn.

La teksto svarmas de tiaj nocioj kiel "konstitucia ĉarto, pakto, suverena kolektivo, kodo, leĝoj, transnacia kulturo, kolektiva identeco, subjekto de internacia juro, suverena funkcioj, leĝdona povo, ekzekutiva povo, arbitracia povo, senato, konsulo, saĝularo (kortumo), prefektoj..." Oni kompreneble planas flagon, blazonon, insignojn, himnon, festotagojn... sed evidente ne armeon.

La franca povas servi al diplomaciaj kontaktoj, kiel bele por romanistoj.

Post la tralego de tiu pompa teksto mi ekhavas la impreson, ke iuj manifestuloj transiras de la bonvena serĉo de novaj vojoj al ridindigo de la afero de E-o mem. Kaj tio rilatas la tutan komunumon kaj ne nur la raŭmismojn. Ĝi riskas ridindigi E-on en ne-esperantistaj medioj. Kaj tiujn mediojn celas la civitplanantoj.

Jam malfacilas argumenti por tia sententia civito en la lingvo-komunumo de E-o mem, kvankam similaj planoj aperadis tra la historio (foje kun teritorio). Sed kion pri la ekstermovada medio? En la "ne-esperantista mondo" jam tre bazaj aferoj pri la lingvo kaj ĝia komunumo ne estas konataj kaj akceptataj. Kaj en tiuj cirkonstancoj oni venas kun la Civito...

Sed ankaŭ tute meza esperantisto kiel mi, kiu laboras praktike kaj teorie demandas sin, kiu volus eniri tian pakton, subiĝi al Konsilantaro de Saĝuloj (kiom saĝaj?), al Arbitracio Tribunalo?

Kiu reprezentu Esperanton kaj sian parolantaron antaŭ pintaj ne-esperantistaj instancoj kaj organizaĵoj? Ĝis nun nature kaj prave tio estis la ĉefa E-organizaĵo, nome UEA. Ĉu estonte ni havu la universalan organizaĵon kaj Esperantan Civiton? Estiĝos bela konfuzo. Kaj tio jam ne plu estas afero nur de la civituloj.

Tia projekto nur pliprofundigos la jam sufiĉe disvastigitan opinionon, ke la esperantistoj (sen distingo de E-parolantoj, E-movadanoj, verdaj donkijotoj ktp.) estas neripareblaj, neseriozaj sektuloj kaj revuloj, kun kiuj ne havas sencon eĉ ekdiskuti.

5. La ofte menciita duco de "pracelismo" kaj "raŭmismo" ŝajnas al mi esprimo de iom tro simplisma aliro al la motivoj de okupiĝo pri E-o, la agado per kaj por ĉi tiu lingvo.

Laŭ mi ĉiam ekzistis diversaj motivoj, por ke homoj lernu Esperanton.

Idealismaj, pragmataj, sciencorientitaj kaj aliaj. Certe nekomplete mi vidas almenaŭ jenajn motivojn, kiuj sin povas komptigi kaj efikas malsame en diversaj periodoj de la esperantistado:

a) La sociharmoniiga motivo (idealisma, humanisma, universalisma): Unversala lingvo (ĉi tie: dua por ĉiuj) estas malnova utopio kaj idealo de plej bonaj kapoj de la homaro. Tia lingvo, ĉar nenies gepatra, havas harmoniigan efikon al la interesaj rilatoj. Tiu "pracela" motivo de Zamenhof ankaŭ hodiaŭ estas unu el la ĉefaj motivoj, kiu movas homojn lerni la lingvon (kaj eble resti en la ne nur brila movado...).

b) La pragmata motivo: La lingvo ekzistas, sekve oni povas uzi ĝin. Eble oni havis malfacilojn, ellerni fremdlingvon kaj nun ĝojas pri tiu relative facile lernebla kaj aplikebla lingvo. Eble ne tro interesas la idealoj de Zamenhof, la tutmonda akcepto de E-o kiel dua aŭ x-a lingvo de la Unuigintaj Nacioj en la jaro 2134... Eble oni nur volas efike kolekti poŝtmarkojn, ami transnacie, vojaĝi malmultekoste ktp., ĉar oni estas juna kaj elproviĝema. Aŭ eble oni estas pensiulo, ne plu havas profesion kaj serĉas iun praktikan lingvan komunikilon, ĉar antaŭe ne povis aŭ ne emis lerni fremdan lingvon. Kaj ion buntan, distran oni ja volas fari, kvazaŭ mensan gimnastikon.

c) La scienca/heŭristika motivo: Ke lingvo - almenaŭ en sia bazo - estas kreata de homo, funkcias, evoluas kaj aplikatas estas ege interesa fenomeno. Eble oni volas konatiĝi kun tiu afero, elprovi, eble studi, analizi ĝin. Ne nepre interesas a) kaj b) (oni jam regas kelkajn lingvojn kaj dubas pri la perspektivo, la angla jam "venkis" ktp...). Tamen: Se oni estas lingvisto, eble valorus kompari tiun fenomenon kun ĝeneralaj lingvistikaj teorioj. Eventuale tiu lingvo ĵetas interesan lumon al aliaj fenomenoj: ekz. al lingvo-planado, terminologio, aŭtomata tradukado, pli facila(?) alproprigo de aliaj lingvoj helpe de planlingvo (= heŭristika efiko).

d) La socirilata motivo: Eble oni ja akceptas a) kaj b), eĉ iom konsideras c) sed ne nepre emas tre aktivi por ĉio ĉi. Oni eble ankaŭ ne tro lernas la lingvon, sed ege bonfartas en tiu iom elitisma kaj solidareca societo, kie nur la esprimo de intereso pri la lingvo mem jam donas al la individuo certan socian akcepton kaj varmon, eĉ foje avantaĝon... Oni do ĝuas la societon kun ties agado kaj apartaj ecoj. Konsiderante, ke la ekstera mondo ne nepre estas tiom normala kaj serioza, kiel ofte asertate, tiu motivo estas bone komprenebla: Ĝi validas por ĉiu minoritata movado.

e) La sociprestiga motivo: Eble oni iom aktivus laŭ a) - d), ne tre sukcesas en la kutima socio, kvankam estas relative ambicia. Pro tio oni ĝojas havi facilan aliron al postenoj kaj pozicioj en tiu lingvo-komunumo, kie oni sin sentas akceptita kaj tuj havas proponon transpreni iun postenon. Oni sin sentas bezonata. Oni eĉ povas akiri kelkajn pompajn titolojn, ekz. akademiano, prezidanto, sekretario (novajn titolojn al bezonuloj ofertas la "Civito"), povas krei beletron, sidi en internaciaj komitatoj, foje babilu kun eminentuloj, doni intervjuon al gazeto ktp. Ĉio ĉi eble estus neatingebla

por "oni" en la "kutima" (ne-esperantista) nacilingva vivo kaj ĉirkaŭo. Kaj aldone: Eble, jen, en la nacilingva viv-ĉirkaŭo eblas fanfaroni pri misteraj postenoj internaciaj, kontaktoj kaj travivaĵoj.

f) La ludisma motivo: Malnova emo de la homo estas ludi, ankaŭ ludi per lingvaĵoj. Tio por multaj estas sufiĉa motivo, por lerni Esperanton, skribi poemon post la tria leciono, proponi reformojn kaj, antaŭ la finstudo de la lernolibro, neologismojn...

Mi volas klare esprimi, ke sen valortakso la unuopajn motivojn, mi simple akceptas ilin.

6. Parolante pri la "interna ideo", "esperantismo" kaj la "praceloj", eblas observi, ke tiuj esprimoj en certaj kuntekstoj havas negativan kunsignon.

Tio riskas forviŝi la vere gravegan kernon de la humanisma zamenhofa strebo.

6.1. Ĉu la lingvo interfratigas? Oni konsciu, ke ĉe Zamenhof la interna ideo esprimiĝas ĉefe en la koncepto de la homfratiga rolo de interetna komunikado per neŭtrala lingvo. Li havis troigitajn esperojn lige al tiu interfratiga rolo. Lapenna daŭrigis tiun direkton de la interna ideo, klopodis modernigi ĝin. Li diris, ke Esperanto estas la plej pura esprimo de la humanisma internaciismo. Tio ŝajnas al mi mistika sinteno. Ni ja scias, ke komuna lingvo ne malebligas reciprokajn buĉadon kaj interbatalon, ofte eĉ plifaciligas ĝin.

Krom tio, la scio de E-o eble eĉ kreas al la kunparolanto negativan sintenon al alia, ĉar pere de la lingvo li/ŝi ekscias, ke li/ŝi havas tute kontrastajn kaj eble neakcepteblajn vidpunktojn.... Do, ĉiu lingvo, ankaŭ E-o, ne nur solidarigas, sed ankaŭ malsolidarigas.

Esperantistoj ne aŭtomate estas demokratioj, kontraŭrasistoj, humanistoj.

Pruvoj pri tio estas multaj, inter ili la fakto, ke fondiĝis eĉ faŝista E-organizaĵo en Germanio (en 1931: Nova Germana Esperanto-Movado), en kiu oni lernis kaj aplikis Esperanton, silentis pri la judeco de Zamenhof, propagandis Hitler ktp. Kaj bedaŭrinde ankaŭ nuntempe ekzistas homoj inter esperantistoj, kiuj neas Auschwitz...

Tamen, ĉio-ĉi feliĉe ne estas tipa, sed periferia fenomeno. Sed tio ja montras, ke la E-komunumo estas certgrade mikromodelo de la ĝenerala socio, nin ĉirkaŭanta, kvankam kun specifaj trajtoj.

6.2. Fakte la nuntempa konkludo el la mesaĝo de Zamenhof (liaj praceloj) estas ege aktuala: Eblas helpi la protekton de la lingvoj per neŭtrala komunikilo. Mortas lingvoj. Konservado de kiom eble plej multaj lingvoj pli kaj pli ofte estas postulata, ne parolante pri la propra gepatra.

Kontraŭstaro al la kulturdetrua, identecdetrua, lingvo-mortiga hegemonia rolo de unuopaj lingvoj kreskas. Tio aparte concernas la rolon de la angla (cetere, siatempe ankaŭ de la rusa, kun efikoj ĝis hodiaŭ). Se ni ne agas kontraŭ tio, ni baldaŭ havos plene makdonaldigitan mondon, kaj anstataŭ sango en niaj vejnoj fluos Coca Cola aŭ io simila. Vide al la plimultiĝantaj interesaj konfliktoj, kiuj plej ofte havas sian lingvo-politikan aspekton, la humanismaj celoj de Zamenhof ŝajnas al mi pli realaj, ol mi mem antaŭ jardeko kredis.

daŭrigo en la venonta numero

ARANĜOJ

INTERNACIA FESTIVALO

La 17-a Internacia Festivalo, IF okazos inter 27.12.2000 kaj 03.01.2001 en Trier, Germanio. IF estas unu el la plej famaj novjaraj aranĝoj en Esperanto. IF ofertas al la partoprenantoj specifan programon por mezaĝuloj kaj junaj familioj kun aŭ sen infanoj. IF estas aranĝo por lingve spertaj personoj, sed laŭdeziro ni ofertas paroligajn kursojn, ekz. por via partner(in)o. Por infanoj estos aparta prizorgo kaj programo (en du grupoj: por junaj infanoj kaj gejunuloj), sub gvido de fakaj kunlaborantoj, gepatroj povas do senĝene ĉeesti prelegojn. Infanoj laŭeble jam havu lingvajn konojn en Esperanto. Subtrijarulo(in)o estas senkotizaj, sed la gepatroj mem transprenas la prizorgon. Disponblas infanaj litetoj. La temo estos: Esperanto kaj infanoj. La programo estas vere bunta kaj certa estas la bona etoso.

Informoj kaj aliĝo eblas ĉe:

Hans-Dieter Platz
Pk 1148

DE-34303 Niedenstein, Germanio
Rete: hdp@internacia-festivalo.de

TEJO-SEMINARIO

Konsilio de Eŭropo oficiale konfirmis akcepton de la projekto de TEJO-seminario, kiu nomiĝos "Ĉielarko de lingvoj - ponto al kulturaj trezoroj". La seminario okazos printempe de 2001 en Budapeŝt (Hungario) en Eŭropa Junulara Centro kaj estos plene dediĉita al internacia movado de Lingvaj Festivaloj. Bonvolu aliĝi al la preparado de la seminario!

Pliaj informoj ĉe:

Sandra Schweder
Nieuwe Binnenweg 176.
NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando
Rete: tejo-officejo@esperanto.org

INDAVIZITO 2001

Indavizito 2001 estas feripropono por esperantistoj en Barato inter 04-11. 02. 2001. La programo estas tute turisma kaj tute en Esperanto. Partoprenantoj vizitos tri ŝtatojn de Barato per veturiloj. Oni povas ekkoni tipan baratan vilaĝon, baratan kulturon.

Pliaj informoj ĉe:

B. Revathi
14-187/1 Padmavathipuram
Tiruchanur Road, Tirupati
Andhra Pradesh 517 501 India
Rete: indavizito2001@rediffmail.com

FERVOJISTA SKISEMAJNO

La 42-a Internacia Fervoja Esperanto-Skisemajno okazos inter 20-27. 01. 2001 en Tatranska Lomnica - Vysoké Tatry, Slovakio. En la programo troviĝas multa skiado, bonetosaj vesperoj kaj konkursoj. Estas bona eblo por skiante ripozi vintre. Oni nepre kunportu bonan humoron!

Aliĝo kaj informoj ĉe:

Ing. Magdalena Fejfičová
A Bernolaka 25/5
SK-010-10 Zilina, Slovakio

FAKA SEMINARIO

La 49-a Praktika Staĝo de Parolata Esperanto okazos inter 20-22. 04. 2001 en Storckensohn, nordorienta Francio. La aranĝon okazigos Mulhouse Esperanto, TAKE kaj IKEF.

Informpeti kaj aliĝi eblas ĉe:

TAKE, IKEF
RN 83 Rue de Tiefenbach
FR-68920 Wintzenheim, Francio

MONATO

Internacia magazino sendependa unika revuo pri politiko, ekonomio kaj kulturo unu el la plej prestiĝaj E-revuoj Petu provekzempleron kontraŭ 2 respondkuponoj ĉe:

Flandra Esperanto-Ligo
Frankrijklei 140,
BE-2000 Antwerpen, Belgio

Kompleta monata kalendaro

La kompleta jara listo de E-aranĝoj daŭre aktualigata de ni, troveblas en interreto <http://www.esperanto.hu>. Korektoj, aldonoj estas bonvenaj! Por ricevi txt-formatan version sendu mesaĝon (enhavo ne gravas) al la aŭtomato: kalendaro@esperanto.org

01-03.12. 3-a Seminario - Cseh-Seminario en Herzberg Harz. Inf: E-Societo Sudharco, Gubernhagenstr. 8, DE-37412 Herzberg, Germanio. Tel: +49-5521-1363

01-03.12. Renkontiĝo okaze de Sankta-Nikola festo, Murzasichle. Inf: Esperanto - Regiona Societo, Sobotské nám. 36, SK-058 01 Poprad, Slovakio

01-03.12. Jarfina kaj Zamenhofa Festo, Lepsiko. Inf: Werner Geidel, Karlsruhe Str. 5, DE-04209 Leipzig, Germanio. Tel: +49-341-4118577

02.12. La tago de Esperanto, Bolzano, Italio. Inf: Rete: leafab@tin.it

02-03.12. Cseh-seminario por instruistoj en Herzberg/Harz. Inf: E-Gessellschaft-Südharz, Grubenhagenstr 8, DE-37412 Herzberg am Harz, Germanio. Tel: +49-5521-1363, fakso: +49-5523-999544

03-05.12. Antaŭkristnaska renkontiĝo Bratislava. Inf: Mgr. Alica Komlóšiová - ESO, Rovníková 6, SK-821 02 Bratislava, Slovakio. Tel.: +421-7-43291604

08-10.12. Faulhaber-semajnfino: Revoj kaj idealoj por la 21-a jc. Elspeet. Inf: Hans ten Hagen, Middenweg 587, NL-1704 BH Heerhugowaard, Nederlando. Rete: ten.hagen.esperanto@wxs.nl

08.12-10.12. 54-a Kultura Semajnfino de sarlande Esperanto-Ligo kaj Sar-Lor-Luks-Unio en Homburg/Saar. Inf: Salranda Esperanto-Ligo, Pf. 1844, DE-66468 Zweibrücken, Germanio. Tel: +49-06332-981190. Rete: sel@mohrbach.de

09.12. 17-a Ĉeĥa-Saksa Tago kun Zamenhofa festo kaj Adventa Vigilio en Usti nad Labem. Inf: Miroslav Smycka, Kojetická str. 90, CZ-400 03 Usti nad Labem, Ĉeĥio. Tel. +420-47-5532417

10-15.12. Zamenhofa Semajno: Iom pli pri la unuaj E-aj revuoj, en Bouresse. Inf: Kvinpetalo, Esperanto-Centro, FR-86410 Bouresse, Francio. Tel: +33-549.428074. Rete: rapley@club-internet.fr

15-17.12. AEROB + Tago de Esperanto-libro en Bratislava. Inf: Mgr. Alica Komlóšiová - ESO, Rovníková 6, SK-821 02 Bratislava, Slovakio. Tel.: +421-7-43291604

17.12. Zamenhof-tago en Székesfehérvár, Hungario. Inf. Rete: antonia@mail.data-trans.hu

17.12. Zamenhofa Tago en Triesto, Italio. Inf: Rete: nored@tiscalinet.it

23.12-03.01. Novjara feriado "Karlova vintro". Inf: Esperinform, d-ro Bojidar Leonov, p.k. 44, BG-4300 Karlovo, Bulgario

27-31.12. 8-a Togolanda Esperanto-Kongreso en Lome. Inf: Gbeglo Koffi, B.P. 13169, Lome, Togolando. Tel: +228-272117, fakso: +228-261066, Rete: esp.togo@cafe.tg

27.12-03.01. 17-a Internacia Festivalo en Trier. Inf: Hans-Dieter Platz (HDP), Postfach 1148, DE-34303 Niedenstein, Germanio. Tel: +49-5624-8007. Rete: hdp@internacia-festivalo.de

FAKA APLIKADO

FAKLINGVAĴOJ EN ESPERANTO

De *Eventoj n-ro 176* ni daŭre aperigas fakliteraturon Esperantlingvan pri diversaj sciencoj. Jen la sekva parto:

- parto 13. -

Stomatologio

CERRETTINI, Paolo: Inplantologio - malgranda gvidado al la procedoj. (Sano 1993/3.

EICHHOLZ, Rüdiger: Esperanta Bildvortaro. Bailieboro, Ont., 1988. ISBN 0-919186-32-7. 60-61 - Duden: Dentisto

SZEMŐK Balázs: Stomatologiaj superstiĉoj kaj miskredoj. = revuo Sano 1981/1.

Timo de infano antaŭ dentkuracisto. = revuo Sano 1983/1.

La stomatologio en la medicino en Hungario. Sano 1988/4.

La nuna stomatologia lingvo. = revuo Stomatologia Forumo 1985/3-4.

La ekzameno de la dentbrosado en la infanĝardeno de vilaĝo Tápiószentmárton. = revuo medicina Internacia Revuo 1987/2.

Laŭseksa diferenco en la kariointenso. = revuo Medicina Internacia Revuo 1988/1.

La elekto de la stomatologiaj vortoj por la hungara-esperanta mezvortaro. = revuo Medicina Internacia Revuo 1988/1.

Mia 25 jara preventa laboro en la lernejo. = revuo Medicina Internacia Revuo 1988/2.

Sinonimoj en la stomatologia lingvo. = revuo Medicina Internacia Revuo 1989/1.

Mia rilato al la pedagogoj kaj infanoj nun kaj komence de la infan stomatologia kuracado. = revuo Sano 1989/3.

Mispaŝoj en la stomatologia konsultejo. = revuo Medicina Internacia Revuo I. Anastezo. 1992/1; II. Ekstraktado. 1992/2; III. Plombado. 1993/1; IV. Protetiko. 1993/2.

Dentopikilo aŭ fadeno. = revuo Scienca Mondo 1993/1.

Novtipaj dentopastoj. = revuo medicina Internacia Revuo 1993/2.

Novtipaj dentopastoj. = revuo medicina Internacia Revuo 1994/1.

La rolo de la fluorizado en la stomatologio. = revuo Scienca Mondo 1994/1.

Fakaj asocioj

Stomatologia Sekcio de Universala Medicina Esperanto-Asocio. fondita en 1982.

Revuoj

Medicina Interancia Revuo: oficiala revuo de UMEA. Aperas duonjare.

Sano: aperas kvaronjare.

Kunvenoj

Internacia Medicina Esperanto-Kongreso: dujare organizita aranĝo, kie ĉiam estas propraj programoj, prelegoj, diskutoj pri stomatologio.

INTERRETO

KDE 2.0 - KUN ESPERANTO

Antaŭ kelkaj tagoj publikiĝis KDE 2.0 - Uniksa Labormedio, kiu provas oferti similkomfortan surfacon al Unikso, kiel havas ekz. Vindozo kaj Makintoŝo. La programo KDE 2.0 venas kun tradukoj al 15 lingvoj, i.a. Esperanto.

Por tiu versio oni anoncis plenan subtenon de Unnikodo. Rezultoj kaj sperto pri la nova versio estas legeblaj ĉe <http://www.esperanto.hu/steb/>.

Wolfram Diestel

Rete: diestel@steloj.de

DENOVE E-INS

Pro organizaj kialoj la retlisto E-INS estas rekreitaj ne ĉe la antaŭa servilo, sed ĉe la konata "egroups.com". Ĉiuj 113 antaŭaj anoj estas aŭtomate registritaj ĉe la nova servilo, ĉe kiu do povas daŭri la diskutoj pri instruaj aferoj.

Ankaŭ novaj interesiĝantoj estas atendataj. Por aliĝi sendu (malplenan) retmesaĝon al e-ins-subscribe@egroups.com aŭ kontaktu la administran estron Mauro La Torre ĉe la retadreso: m.latorre@uniroma3.it.

Ret-Info

XZIKK - ĈINA KOMERCA E-KOMPANIO

Post unu jara praktiko Xian Zhiyuan Internacia Kultura Kompanio (XZIKK) oficiale prenis Esperanton kiel ilon en sia komerca agado ekde julio, 2000.

La kompanio estas fondita de ĉina esperantisto Qiu Shi, kaj celas uzi Esperanton en turismo, komer-

co, kulturo, edukado kaj aliaj kampoj kunlaborante kun eksterlandaj organizoj kaj individuoj. La asocio havas retpaĝon ĉe: <http://www.e-reto.com>.

Interesatoj povas peti pliajn informojn ĉe:

Qiu Shi

Huanchengnanlu Xiduan 29-602#,

CN-710068 Xian, Ĉinio

Rete: ioelreto@pub.xaonline.com

KONTAKTO SERĈATA

EKSTERAFRIKAJ AFRIKANOJ SERĈATAJ

La Afrika agado 20-jariĝas. La rezultoj de tiu agado palpeblas ne nur en Afriko sed ankaŭ ekster la kontinento. Tiu flanko de la agado estas iomete neekzistanta. Ĝi do bezonas apartan atenton.

Multaj ne-Afrikanoj ŝatus scii pri Afriko. Esperanto jam ebligas al la

esperantistoj atingi tiun ĉi celon, kaj la esperantistoj-afrikanoj devas uzian lingvokonon por tio.

Afrikanoj povos ion tian organizi por prezenti Afrikanon. Tiaj aferoj neniam eblas, se la afrikanoj mem tute ne aktivigas ekster Afriko.

Mi serĉas ĉiujn eksterafrikajn afrikanojn por kunlabori konigi Afrikanon per Esperanto, konigi Esperanton per Afriko.

Gbeglo Koffi

B.P. 13169, Lome, Togo

Rete: esp.togo@cafe.tg

"EUROPO" NE PLU!

La diskutgrupo "europo" ĉe egroups.com estis unu el la plej interesaj retlistoj, kie oni diskutis pri la inda strategio kaj taktiko sekvenda ĉe la agado por E-o ene de Eŭropa Unio, pri la neceso havi surlokan UEA-buroon en Bruselo, pri aktualaj lingvaj demandoj ene de la nuna EU-administrado, ktp. Ekde la 7-an de novembro tamen la retlisto "europo" ne plu funkcias. Ĝia fondinto Dafydd ap Fergus, profesia ĵurnalisto ĉe EU, haltigis kaj fermis ĝin.

Kiel rezulto de la tieaj diskutoj kaj komuna pensado, la 25-an novembro en Roterdamo okazis kunveno por preparoli kaj decidi pri la onta agado, eventuala loka UEA-buroo en Bruselo.

laŭ adiaŭa komuniko el "europo"

La interreta serĉilo Metamonster haveblas jam ankaŭ en Esperanto. Ĝia adreso estas: www.metamonster.com/esperanto

MOVADO

MALFERMITA PORDO ĈE MUZEO

La 26-an de oktobro la Nacia Biblioteko havis sian tradicion "Tagon de la Malfermita Pordo". Pro tio ankaŭ la Internacia Esperanto-Muzeo, IEM akceptis inter la 10-a kaj la 17-a horoj vizitantojn - per speciala programo: S-rino Smideliusz el Hungario ĉiuhore prezentis Esperanton per la tiel nomata Csehmetodo: t.e. nur uzante la internacian lingvon, sen iu ajn nacilingva klarigo. La esenco de tiu instruado



konsistas en la kreo de amuzaj komunikaj situacioj, en kiuj la partoprenantoj tuj komprenas la vortojn de la instruistino - samtempe amuziĝante.

Vizitis la Muzeon en tiu tago entute 357 personoj, inter kiuj 86 partoprenis la kursojn. Duono de ili estis el eksterlando, precipe el Ĉeĥio kaj Slovakio, sed ĉeestis ankaŭ rusoj, hispanoj, japanoj, svisoj ktp.

La bonan efikon de la aranĝo oni vidas en tio, ke post tiu tago pluaj novaj personoj aliĝis al Esperanto-kurso en popola altlernejo, pri kiu oni varbis en la Muzeo.

Herbert Mayer

Rete: herbert.mayer@onb.ac.at

ELEKTO DE B-KOMITATANOJ

En 2001 okazos elekto de novaj gvidorganoj de UEA. Parto de tiu procezo estas elekto de komitatanoj B kiel reprezentantoj de la individuaj membroj, IM en la Komitato de UEA. Laŭ la Statuto oni elektas unu komitatano B por ĉiu komencita milo da IM. Laŭ la antaŭvidebla nombro da IM je la 31-a de decembro 2000 oni elektos sep komitatanojn B por la periodo 2001-2004.

Kompletaj proponoj devas atingi la Centran Oficejon de UEA en Roterdamo ĝis la 28-a de februaro 2001. Validaj estos nur skribaj dokumentoj kun originalaj subskriboj (t.e. ne telefaksoj aŭ retmesaĝoj).

Ĉiu kandidato devas esti individua membro de UEA dum du jaroj antaŭ la elekto (t.e. 1999 kaj 2000)

kaj kompreneble kotizi ankaŭ por 2001.

Salajrata oficisto de UEA ne rajtas esti komitatano. Jama komitatano estas reelektebla kondiĉe ke en la periodo 1995-2000 li/ŝi ĉeestis almenaŭ unu komitatkunsidon. Oni tamen memoru ke la elektoj estas ŝanco alporti freŝajn fortojn kaj ideojn al la gvidado de la Asocio.

Se ne estos pli ol sep validaj kandidatoj, oni konsideros ĉiujn elektitaj.

Se ili estos pli multaj, la individuaj membroj ricevos en aprilo voĉdondilon por elekti siajn reprezentantojn per baloto.

Uzu vian demokratian rajton reprezentigi en la supera gvidorgano de UEA!

Osmo Buller

HELPANTOJ DE LA ZAGREBA UK KLERIĜAS

Kvindek membroj de Kroata Esperanto-Ligo entreprenis okaze de la Ago-Tago 4-tagan kurson pri turismo. La kurson organizis la agentejo Generalturist, la ĉefagentejo de la 86-a UK, inter 07-10. 10. 2000.

Pri diversaj aspektoj de la turisma fako prelegis pluraj profesoroj. La kurso finiĝis per ekskurso al Vrazdin, unu el la kongresaj ekskursoj. Dum la ekskurso la kursanoj

lernis pri praktiko de grupgvidado.

La sukcesintoj ricevis diplomojn kiuj rajtigas labori en turisma fako en la nivelo de turismaj akompanantoj. La turisma kurso por esperantistoj-helpantoj de UK en Zagrebo estis senpaga, je la kosto de la turisma agentejo.

Krome, ekde la 13-a de oktobro okazis tri lingvaj kursoj en la Zagreba Esperanto-Societo "Bude Borjan" por kontribui al lingva perfektigo de la helpantoj de la 86a UK.

CO de UEA

SUKCESA SOMERO DE KVINPETALO

La franca Esperanto-centro, Kvinpetalo finis sukcesan somaron. En Kvinpetalo estis okazigita ĉi jare la ILEI-kongreso kaj krome oni aranĝis en ĝi staĝojn dum ses semajnoj.

Kvinpetalo eĉ povis aĉeti plian domon danke al la helpo kaj donaco de Societo Yvonne Martinot.

G. Lagrange

DISTINGO AL HONORA IFEF-PREZIDANTO

En Vieno, okaze de la ĝenerala kunveno de internacia fervojista asocio, FISAIC, Honora IFEF-Prezidanto Joachim Giessner estis honorigita per la titolo honora membro de FISAIC. Li ricevis la honoron por lia konstanta agado ene de FISAIC kaj ĉefe por la disvolviĝo de la rilatoj inter FISAIC kaj diversaj orientaj landoj de Eŭropo.

Jean Ripoché

Rete: jean.ripoche@wanadoo.fr

TV-ELSENDOJ EN KROATIO

Post la vizito al Finnlando, kie la 11-jara knabino Stefani Strunjak la 18-an de oktobro gajnis duan premion pri infanfabelo en Esperanto, Stefani estis gasto de du televidaj elsendoj. En ambaŭ Stefani rakontis por plenkreska kaj aparte por infana publiko pri siaj spertoj per Esperanto en Finnlando. Du elsendojn ŝi filmis en la lasta semajno de oktobro kaj por novembro plia infanredakcio ĉe TV petis intervjuon de la knabino.

S. Štimec

Rete: esperanto@zg.tel.hr

ĜEMELIĜO KAJ ESPERANTO

Ankaŭ Esperanto-gelernantoj partoprenis la ĝemeligan feston de la rumania urbo, Gherla kaj de Forcheim, Germanio, kiu okazis en la germana urbo. La rumaniaj lernantoj lernis Esperanton ekde januaro ĉi jare, kiun iniciatis la germanoj por ke la rumaniaj mezlernejoj povu uzi nian lingvon dum la ĝemeliĝa kunveno. La vizitado estis bona eblo por plifamigi esperanton.

laŭ Bazar, aŭtuno 2000

ERA: ESPLORVOJAĜO: LA VERO!

Eventoj n-ro 196 publikigis misfamigajn akuzojn de s-ro István Ertl kontraŭ ERA kaj ties Sekretario pri la eldono de "Esplorvojaĝo".

Premisinte ke misfamigi pere de gazeto estas kontraŭleĝa faro, ERA precizigas la jenon:

1) Sinjoro Ertl neniam havis enmane la libron eldonitan de ERA, sed nur kelkajn paĝojn de ĝi. Alikaze li estus vidinta ke la paĝoj de la mallonga rakonto de Verne konsistigas nur ĉirkaŭ trionon de la tuta publikigaĵo, kie la teksto pli longa, grava kaj malfacila por traduko ne estas la malgranda nefinita rakonto de Verne, sed la kritika-filologia aparato kaj la ekstreme prizorgataj notoj koncernantaj la plurajn eblajn interpretadojn de la manuskripto de Verne.

Sekve ĉiu ajn komparo kun la eldono citita de s-ro Ertl estas absolute misvojiga, ankaŭ konsidere al la fakto ke, krom la itallingva traduko, apud-estas ankaŭ la franca originalo.

2) La Sekretario de ERA komisiis kaj enplektis en la italan kaj Esperantan tradukojn ja 6 personojn, el kiuj almenaŭ 3 perfekte sciopovas Esperanton. Ĉiuj neniam estis ekkonintaj kaj legintaj la eldonon cititan de Ertl.

3) ERA aĉetis en 1997 - kun ekskluziveco - ĉiujn rajtojn pri la rakonto de Verne kaj pri la tuta kompleto de la studoj al ĝi kunligita por la lingvoj itala kaj Esperanto. Nur je la fino de 1998 la Sekretario de ERA, Giorgio Pagano, hazarde, eksciis pri la ekzisto de kajo eldonita de la franca esperantista asocio.

ESPLORVOJAĜO - KIU ĜIN TRADUKIS?

En Eventoj n-ro 196 (kaj samtempe en Ret-Info) aperis averto de István Ertl kontraŭ la trilingva eldono de "Esplorvojaĝo" de Jules Verne, kiun aperigis "Esperanto Radikala Asocio", ERA. Ne pro malbona traduko - sed ĉar la traduko laŭ li estas piratado de lia propra traduko, - sen lia permeso kaj eĉ sen mencio de lia nomo. S-ro Ertl mem tradukis la koncernan verketon de Verne por literatura numero de la revuo "Franca Esperantisto" de Unuiĝo Franca por Esperanto, UFE, kiu aperis en aprilo 1994.

En sia defendo, ERA skribas "ke la paĝoj de la mallonga rakonto de Verne konsistigas nur ĉirkaŭ trionon de la tuta publikigaĵo [de ERA], kie la teksto pli longa, grava kaj malfacila por traduko ne estas la malgranda nefinita rakonto de Verne, sed la kritika-filologia aparato kaj la ekstreme prizorgataj notoj koncernantaj la plurajn eblajn interpretadojn de la manuskripto de Verne". Kaj ERA do konkludas ke "ĉiu ajn komparo kun la eldono citita de s-ro Ertl estas absolute misvojiga, ankaŭ konsidere al la fakto ke, krom la itallingva traduko, apud-estas ankaŭ la franca originalo". Al tio facile eblas respondi, ke ne la amplekso de ilia eldono estas diskutata: temas nek pri la trilingveco nek pri la aldonita notaro; temas nur pri la E-traduko mem.

Koncerne tiun punkton, estas iom strange, ke ERA parolas pri kunlaboro ĉe ilia eldono de 6 personoj "el kiuj almenaŭ 3 perfekte sciopovas Esperanton", sen mencii eĉ unu tradukinton. Se oni ne agnoskas la aserton de s-ro Ertl, ke funde temas pri lia traduko (kun iom da etaj eraroj eniĝintaj), kial do ne montri kiu

Sekve eventualaj similecoj kun la traduko de sinjoro Ertl estas, ĉe la kontrolo de la faktoj, tute hazardaj kaj facile klarigeblaj per la granda simpleco de la lingvaĵo uzata de Verne kaj per la preskaŭa unusignifeco de la respondataj vortoj en Esperanto.

Cetere, kial ERA devintus pagi altan prezon por ekskluzivaj rajtoj, se tiuj ne estis ekskluzivaj?

Nur pri unu afero sinjoro Ertl pravas: ke, ĉe la preso de la libro, oni povintus citi la kajeron de li tradukitan. Tamen estas ankaŭ vere ke la traduko produktita de ERA estas fidela al la francaj tekstoj, kaj tie ne troviĝas spuro pri ekzisto de lia traduko. Ne nur, sed tio signifintus por ERA:

- aŭ jure plendi kontraŭ tiuj, kiuj vendis al ĝi ekskluzivecajn rajtojn, kiuj ekskluzivecaj ne estis;
- aŭ estigi problemojn fare de la advokatoj de "Le cherche midi editeur" al la amikoj esperantistoj de UFE tial ke ili tradukis kaj publikigis en Esperanto tekston, pri kiu ili ne ricevis la rajtojn (pri ricevo de tiuj rajtoj s-ro Ertl ĝis nun ne havigis al ni pruvon).

ERA konsideris ke, ĉar jam estis pasintaj 4 jaroj depost la eldono de la amikoj de UFE, kaj ĉar tiu eldono estas tre magra, ĝi ne povos porti damaĝon al la eldonaĵo de ERA, kaj ankaŭ ke eventualaj interesuloj jam havis 4 jarojn por utiligi ĝin.

Tial ni negative respondis al la monpostulo al ni farita de sinjoro Ertl.

ERA, via di Torre Argentina 76
IT-00186 Roma

estas ilia tradukinto?

Laŭ mia supozo, la vera problemo por ERA kuŝas tie, ke ĝi laŭdire "aĉetis en 1997 - kun ekskluziveco - ĉiujn rajtojn pri la rakonto de Verne kaj pri la tuta kompleto de la studoj al ĝi kunligita(j) por la lingvoj itala kaj Esperanto", dum efektive tiumomente jam ekzistis antaŭa E-eldono. Pagante por ekskluziveco, ili do elspezis por afero ne plu ekzistanta. Se ili pli bone konus la Esperantan libromerkaton, ili ne estus farintaj tiun eraron.

Nun estas unu el la taskoj de Esperantlingva Verkista Asocio, EVA defendi la rajtojn de niaj E-aŭtoroj. Kaj tial ĉi tion mi skribas. Ĉar al la akuzo de kolego Ertl, ke lian tradukon ERA uzis senpermeso, ne jam estas respondite en maniero kontentiga. Ne nur mankas la nomo de ilia(j) tradukinto(j) sed ja vere nekontentiga estas ilia aserto, ke "eventualaj similecoj kun la traduko de sinjoro Ertl estas [...] tute hazardaj kaj facile klarigeblaj per la granda simpleco de la lingvaĵo uzata de Verne kaj per la preskaŭa unusignifeco de la respondataj vortoj en Esperanto".

Ĉar kiu ja iom spertas pri literatura tradukado, ne nur pri komplikaj sed des pli pri t.n. "simplaj" tekstoj (kiuj ja estas multege pli malfacile tradukeblaj: mi parolas el vasta sperto!), tiu ankaŭ konscias, ke ĉe tradukado de la amplekso de eĉ nur kelkaj paĝoj ia preskaŭa simileco inter la rezulto de malsamaj tradukintoj bordas je miraklo, almenaŭ se ili laboris tute seninflue unu de l' alia. Do, restas ankoraŭ solvota la demando: kiel eblas ke la traduko de ERA tiom similas je tiu de István Ertl?

Gerrit Berveling
Prezidanto de EVA

REAGO DE ERTL AL ERA

Estas malĝojige konstati ke ekzistas parolantoj de Esperanto kiuj ne nur priŝtelas samlingvanon, sed, kaptitaj ĉe la freŝa faro, eĉ neas sian misagon kaj, ŝtelintaj mem, akuzas la priŝteliton.

Bedaŭrinde, mi vidas min devigita reagi al tio kion la Gazetara Officejo de "Esperanto" Radikala Asocio nomas, en sia komunikado dissendita de Ret-Info, kaj de Eventoj ĉi supre, "Esplorvojaĝo: la vero!".

Mi posedas la libron eldonitan de ERA, tiel ke mia juĝo baziĝas ne sur "kelkaj paĝoj", sed sur la tuta volumo. Ja tiel mi povis konstati ke ĝi estas "amatore kaj erarplene farita". Ekzemple,

- mankas indiko pri la eldonjaro kaj -loko;
- mankas indiko pri la origina franclingva eldono (San Carlos et autres recits inedités, "le cherche midi editeur", Paris, 1993); - sur p. 84, anst. "kompletigi la" oni legas "kompletila"; - sur p. 106, la franca loknomo Compiègne iĝas Compiexgne; - sur p. 118, noto al p. 16, l. 7, oni legas la vortomonstron "apparaiaaccentocirconsullaitre"; ktp.

Sed tio ne gravas rilate la nunan demandon. Gravas ke, eĉ se la Esperanta traduko de la koncerna verko de Jules Verne konsistigus nur centonon de la volumo de ERA, tio ne ŝanĝus la fakton ke tie aperis, tute rekoneble, traduko farita de mi.

Estas do perfekta miraklo ke tiuj ses anonimuloj rekreis mian tekston kun 99,9%-a fideleco, des pli ke tri el ili ne "perfekte sciopovas Esperanton".

Sed tiam s-ro Pagano ne prokrastis aĉeti ĝin, per telefona mendo la 22-an de oktobro 1998, de la Libroservo de UEA.

Lingvan simplecon, similecon de du tradukaĵoj aŭ similan povas aserti nur homo ŝajn-naiva aŭ kiu neniam faris mem beletran tradukon. Mi pli emas klarigi la similecon de la tekstoj per la fakto ke s-ro Pagano havis je dispono mian tradukon.

Ne estas tasko de tradukisto zorgi pri akiro de rajtoj, kaj des malpli havigi pruvojn pri akiro de rajtoj. Tamen, mi kompleze sciigas ke, pri la eldono de "Esplorvojaĝo" en 1994 en la revuo Franca Esperantisto, ĉi ties redaktoro, Herve Gonin, informis min jene:

"Kiam mi publikigis en aprilo 1994 en F.E. vian tradukon de "Esplorvojaĝo", permeso estis petita de la franca eldonisto "Le cherche midi editeur", kiu vendis al ni la aŭtorrajtojn por ununura eldono."

Mi neniam postulis nek nun postulas monnon (kvankam por eldonejo profesia devus esti normale ke kontribuantoj ricevu honoraron). Mi skribis jene al s-ro Pagano:

Povus esti ke ĉe ERA oni aŭdis nur pri materia, ne pri morala damaĝo; ĉiukaze, mi ja postulas ke ERA min sendamaĝigu: per publika agnosko ke ĝi senpermeso aperigis mian tradukon, sen mencio de mia nomo. Eble ankoraŭ ne estas tro malfrue por ERA savi sian nomon de kompleta morala senkreditiĝo.

"Fari al si precizan ideon" eblas nur per komparo. Kontraŭ internacia respondkuponno, mi pretas sendi al petontoj kopiojn de naj tekstolokoj el la eldonoj de UFE resp. ERA. La unua eldono de "Esplorvojaĝo" (UFE, 1994) daŭre haveblas ĉe UEA kaj supozeble ankaŭ ĉe UFE (4,80 eŭroj ĉe UEA).

István Ertl

MALLONGE

Aperis la lernolibro "Enkonduko en la japanan" de Yamasaki Seiko. Ĝi enhavas 20 lecionojn kaj kulturajn interesajojn pri Japanio. La libro mendeblas de: Flandra Esperanto-Ligo, FEL, Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen, Belgio.

Kun la titolo "Esperanto Halqaro Tili" ("Internacia Lingvo Esperanto") haveblas Esperanto-uzbeka libro ĉe la libroservo de UEA. La libro enhavas 12 lecionojn, duflankan vortaron, konversacilibreton kaj esperantlingvan priskribon de la uzbeka lingvo.

Aperis kolora informilo pri la projekto Interkulturo kun la titolo "Vizaĝoj de Interkulturo". Ĝi riceveblas de: Hungara ILEI-sekcio, Pf. 193. HU-1368 Budapest, Hungario.

Eldonis broŝuron Esperanto-Grupo de Nürnberg, Germanio kun la titolo "Rerigardo 99". En ĝi troviĝas artikoloj - kelkaj en la germana - pri la laboro de lokaj esperantistoj. Ĝi riceveblas kontraŭ 2 respondkuponoj de: Anny Hartwig, Pirckheimerstr 11, DE-90408 Nürnberg, Germanio.

Okazis la 35-a semajnfina kursaro de Meklenburgo-Antaŭpomeranio, Germanio inter 27-29. 10. 2000 en Neubrandenburg. Oni povis partopreni tri diversnivelan Esperanto-kurson.

Estis elsendita programo pri rusa Esperanto-familio en TV6 en Ruslando. Sciindas, ke en la familio troviĝas esperantistoj de tri generacioj.

Estis starigita la unua Esperanto-monumento, ZEO en Kostariko kaj verŝajne en tuta mezameriko. La objekto estas 60x60 centimetra memortabulo kun la teksto: "Carlos Gagini (1865-1925) eminenta kostarika pioniro kiel filologo kaj kulturisto de lingvo internacia Esperanto. Memoriganta la 75-an datrevenon de lia forpaso: la 31-an de marto 2000 Kostarika Esperanto-Asocio".

Esperante prelegis Roman Dobrynski, raportisto en Pola Televido antaŭ la publiko de turisma kaj komunika seminario en Curitiba, Brazilio.

Paranaa Esperanto-Asocio ekis disigi Esperanto-librojn en diversaj librovendejoj de la urbo Curitiba, Brazilio. Oni prefere elektis vendejojn kun plurlingvaj libroj.

INSTRUADO, ILEI

ESPERANTO-KVARTETO - REELDONITA

La ludo por Esperanto-lernantoj, Esperanto-Kvarteto (vidu Eventoj n-ro 189. p. 7.) estas pro la granda interesiĝo post la elĉerpiĝo profesivele reeltonita. Nun ĝi kostas 12 DEM + sendokostoj. Ĝi mendeblas ĉe:

Munkena Esperanto-Junularo
Postfach 20 07 12
DE-80007 München, Germanio
Rete: anaso1@aol.com

"SUPERMARKTO" KAJ "TELEGRAMO"

La bretona asocio "Esperanto Bretagne" eldonis du videokursojn pri Esperanto. La titoloj de la partoj estas "Supermarkto" (25 minuta) kaj "Telegramo" (45 minuta). La partoj produktis amatoraj aktoroj per digitala - perkomputila - tekniko. La lecionoj haveblas en videokasedo kaj en KD. La kasedo - kun du lecionoj - kostas 50 FRF, la kompakt-disko - kun unu leciono - kostas 25 FRF.

Pliaj informoj kaj mendo eblas ĉe:

Denis-Serge Clopeau
6. rue J. P. Calloc'h, FR-22000 St Brieuc, Francio

ANONCETOJ

La 4-an de julio 2000 naskiĝis en Brescia, Italio la dua filino de Luigi Fraccaroli kaj Donatella Feretti. ŝi nomias Linda kaj fartas bone. Por la kuriozemoj, ŝi estas ruĝhara. La gepatroj kaj la 4-jara fratino Valeria tre ĝojas.

Instruisto de infanoj inter 9- kaj 12-jaraĝaj serĉas kunlaborantojn kaj grupojn por korespondado kaj spertointerŝanĝado. La klubo bezonus ankaŭ gantopupojn, fingropupojn kaj infanlibrojn aŭ tekstojn de facilaj teatraĵoj. Materialojn kolektas kaj plusendas: Esperanto-Centro, Falkstr. 25. DE-12053 Berlin, Germanio.

Nova, kaj nun sole funkcia retadreso de E-redakcio de Ĉina Radio Internacia estas: "espradio@cri.com.cn" Bonvolu aktualigi vian notlibron!

Henning Hauge informas pri ŝanĝo de retadreso. Bonvolu noti la novan retadreson, kiu jam validas de nun. ĝi estas: esperanto-nord@web.de

RADIO

RADIO AŬSTRIA INTERNACIA

Post la novstrukturiĝo ĉi jara la radiostacio mem ne plu elsendas je la kostoj de la registaro, ĝi iĝis parto de la entrepreno ORF, kiu estas sendependa stacio "Aŭstria Radio kaj Televido". Ĝi disponigos por la sekva jaro 2001 la duonon de la ĝisnuna budĝeto. (nur 50% !) La novstrukturiĝo estas memkompreneble la rezulto de la ŝpar-politiko de la nuna registaro.

Kun bedaŭro mi konstatas, ke en Esperantio oni apenaŭ interesiĝis pri la temo dum la tempo kiam estis la krizo, kvankam plurloke aperis alvoko por helpagado. Eĉ dum la kunsido de radio-amikoj dum UK en Tel-Avivo oni ne informis la partoprenantojn pri la problemoj.

Mi estas kontenta, ke mi povis tamen savi la programon, parte pere de financa subteno de geaŭskultantoj, parte per antaŭvidataj varbodisaŭdigoj. Nur ne tiom abunde kiel ĝis nun.

Dum la vintra periodo 2000/2001 estos nur 2 Esperantlingvaj programoj elsendotaj de Radio Aŭstria Internacia dum vendredaj kaj dimanĉaj vesperoj, je 21.30 UTC en la frekvencoj 6155 kHz, 5945 kHz por Eŭropo kaj en 13730 kHz por Nordafriko.

Memkompreneble nek la satelita, nek la reta programaliro estos limigota.

Katalin Fetes-Toszegi
Rete: roi.esperanto@orf.at

KORESPONDADO

9 jaraĝa knabo serĉas korespondamikojn el la tuta mondo. Li preferus interkonatiĝi kun esperantistoj-infanoj. Adreso: Karlo Kovács, Rákóczi u. 140, HU-3414 Bükkszer, Hungario.

Mi estas 10 jara knabino esperantistino, komencantino. Mi deziras korespondadi kun samaĝaj infanoj el la mondo. Mi kolektas poŝtmarkojn. Adreso: Loren Durand, c/o Patrick Forget, 1, Rue de l'Eglise, FR-89530 Saint Bris, Francio. Rete: esperanto.ppmc@wanadoo.fr.

19 jaraĝa fraŭlino deziras korespondi kun 20-30 jaruloj el la tuta mondo. Ŝi studas juron kaj ŝatas muzikon. Adreso: Jelena Pronjajeva, Kommunarov 135 k. 52, RU-399783 Elec, Rusio.

Mi estas viro, 60 jara, mi havas edzinon kaj tri plenkreskajn infanojn. Mi deziras korespondi kun ĉiuj pri diversaj temoj. Adreso: Stig-Goran Ebbehed, Estra Storgatan 101 B, SE-554 52 Jonkoping, Svedio. Rete: ebbehed@telia.com.

NOVA VAGADO

Amanda Higley, usona esperantistino vagadis dum 16 monatoj en Eŭropo pere de Pasporta Servo. Intertempe ŝi vizitis multajn landojn de la kontinento, interkonatiĝis kun multaj samideanoj kaj partoprenis kelkajn Esperanto-aranĝojn: IJK, TEJO-seminario en Strasburgo, IS, IJF, KEF, ktp.

La usona vagemulino denove ekvagadis. Nun ŝi traveturas Usonon kaj parton de Kanado por prelegi pri siaj travivaĵoj. Ŝi jam ricevis plurajn invitojn de diversaj kursoj.

laŭ Esperanto-USA oktobro 2000

ESPERANTAJ LANGOVOLVILOJ

1. Ĉu ŝi scias se ĉi scene la sklavo ŝtelos la sceptron?
2. Ŝi ŝerce ŝanĝis la ŝargaĵon.
3. Postscio pri sciencfikcio.
4. Tri tre drinkemaj fratoj trafis truon de l' trotuaro.
5. Frivolaj friponoj fervore priridas perfortajn fervojojn.
6. Scivolema sciuro.
7. Ne ploru, plorulino, pro propra plezuro.

el <http://esperanto-vr.vila.bol.com.br/artikoloj.html>

AKCIDENTO KAJ BEDAŬRO

Malfeliĉa bofilo, gramatika profesoro, diras al siaj lernantoj, klarigante la malsamajn signifojn de la vortoj "akcidento" kaj "bedaŭro".

Supozu ke vi marveturas kun via bo-patrino kaj ŝi falas en la akvon. Tio estas akcidento.

Supozu ke tuj maristo sin ĵetas en la akvon por ŝin savi. Jen, tio estas vera bedaŭro.

el *Anekdotoj en Esperanto*

EVENTOJ, Njt. sz.: B/TSZL/85/1991. ISSN 01215-959 X
A szerkesztőség címe: HU-1675 Budapest, pf. 87.
Tel./fax: 282-88-85. E-posta: eventoj@esperanto.org
<http://www.esperanto.hu/eventoj1.htm>
Megjelenik kéthetente.
Nyomás: SZELKER Bt. HU-1149 Bp, Fogarasi u. 17/A
EVENTOJ, internacia gazeto pri la Esperanto-movado,
en kunlaboraj rilatoj al Hungara E-Asocio.
Eldonas LINGVO-Studio. Redaktas: Axel Ország-Krysz
Officeja kunlaboranto: István Mészáros.
Respondeca eldonanto kaj ĉefredaktoro: László Szilvási.
La redakcio ne nepre konsentas pri la enhavo de unuopaj
artikoloj, kaj ne respondecas pri la anonc-enhavo.
Abonkoto: 74 nlg (aere 86 nlg) al la UEA-kodo ELLS-S.

ĈU VI PAROLAS LA AGRESANTAN?


daŭrigo de la antaŭa numero

La fino de lando

Mi sukcesis trovi en interreto kaj komuniki kun usona eksoldato, kiu havis kontaktojn kun skipo de Agresantaj soldatoj. Li konfirmis al mi la informon, kiun mi havis pri la fino de tiu projekto. La Agresantoj konstante deĵoris en tiu sama teamo kaj tial ili estis bonege preparitaj, pli ol la ordinaraj soldatoj, kiujn ili devis trejni. Superaj en la batalekzercoj, tio certe ne estis utila por la animstato de la senspertaj ordinaraj trupoj.

La plej decida faktoro tamen estis la troa entuziasmiĝo de la Agresantoj. Ili havis unikan uniformon kaj propran lingvon, tial ili komencis senti sin parto de ekskluziva komunumo. Lingvo evidente rolis kiel identiga propraĵo. Ili forgesis sian apartenecon al la sama armeo de la ceteraj usonanoj kaj kelkaj ofte provokis disputojn ekster la deĵorhoroj. La provoj teni ilin sub disciplino (porti la apartan uniformon estis malpermesate) estis vanaj. Iaspeca raŭmisma efekto, se la filozofoj de nia movado permesas al mi leĝeraniman komparon, kondukis al la fino de la "lando" kun oficiala lingvo Esperanto. El la libroj, unu el la plej pensigaj detaloj estas grandlitera averto sur komenca paĝo: "La trupoj rolantaj kiel Agresantoj estas usonaj soldatoj. Ne vundu ilin, nek damaĝu ilian aparataron". Necesis bridi la entuziasmon de la soldatoj, kiel oni faras al infanoj en viglaj ludoj. Alikaze, meze de batalo oni povus revii pri gloraj venkoj kaj vundi kunulon. Ho, se ĉiu milito estus tia, se en ĉiu soldata instruo estus la averto "La trupoj rolantaj kiel Agresantoj estas homoj, same kiel vi, tial ne mortigu ilin"!

Manlibroj, kiuj rilatas al Agresantoj (la datoj de la eldonoj estas tiuj, kiujn mi posedas – ili aperis en diversaj eldonoj):



INTERESE

FM-30-101 The Maneuver Enemy (Jan. 1953)

FM 30-101-1 Esperanto, the Aggressor Language (Feb. 1962)

FM-30-102 Handbook on Aggressor Military Forces (Sep. 1955)

kun mapo pri la fikcia lando: ĝi korespondas en Ameriko pli malpli al suda Usono.

FM-30-103

Aggressor Order of Battle (Jun. 1955)

Detala kataloga skemo de ĉiuj Agresantaj militunuoj, taĉmentoj kaj estroj. Fikciaj fortoj prezentas multnaciadan devenon. La plej konataj nomoj por ni estas Perón, Quintana, Quevedo, Bianchi, Magalhaes, Leal, Brunet, Amato, Aguiar, Zimmermann, Rosas, Ruiz k.a.

La Usona Armeo kaj Esperanto

"En la 50-aj jaroj Esperanton uzis la usona militistaro. Ĉu kredeble? Ne, nur la senlima imagpovo de nia samideanaro... Tiel skribis BEL.

Tamen tio ne estis pura rmito. Tiam laŭ onidiro la usona ĉefa komando intencis ŝajnigi pli reala sian manovran militludon, kaj pro tio misuzis Esperanton. La atakema, "malamika" armeo uzus fremdan lingvon, nekomprenblan por defendo, nacia armeo. Kaj tiu malamika fremda lingvo estus Esperanto. Mi ne scias, ĉu la usonaj militistoj fakte havis tian planon, aŭ ĉu ili ĝin efektiviĝis. Sed restas fakto, ke en la esperantistaj medioj oni pasie diskutis la miraklan (NEGATIVAN) efekton por nia movado, se Esperanto estus "rangaltigita"?! al la kategorio de *malamika* lingvo. Krom tio, la armeo certe masakrus nian idiomon, adaptante ĝin al siaj celoj...

de James Piton
el *Brazila Esperantisto*
n-ro 311, junio 2000

ŜERCAJ RIMARKOJ

- Ĉu ateisto povas aĉeti asekurecon kontraŭ "agoj de dio"?
- Mi opinias, ke kvin el kvar homoj trovas frakciojn malfacilaj.
- Mi ne havas bonan solvon, sed mi admiras vian problemon.
- Se metala fajfilo estas farita el metalo, el kio oni faras nebulhupon?
- Ĉu laboristoj de firmao Lipton (mond fama teo-farejo) paŭzas por

trinki kafon?

- Sur formularo por akiri stirlicencon oni devas priskribi la hararkoloron. Kion skribu tutkalvulo?
- Se hodiaŭ la temperaturo estas nulo gradojn, kaj morgaŭ estos duoble pli malvarma, kio estos la temperaturo morgaŭ?
- Kial gluajo ne fiksis sin al la interno de la botelo?

el *Inter Ni* n-ro 172